



## La Civitanoj de la Mondo voĉdonas

La ĝermoj de perfortoj, kiujn estigas la mizero de la plimulto rilate al la abundo, kiun ĝuas malplimulto da terloĝantoj, la atmosferaj kaj akvaj poluadoj, la akaparo kaj la malŝparado de la fosiliaj energifontoj kaj de la maloftaj krudmaterialoj, la nesekureco de la loĝantaroj, la rapidega popolkreskado, la mona malordo, la plioftiĝo de perfortoj, de militoj kaj de fenomenoj pri sociaj ruiniĝoj...

problemas mondnivele kaj superas la kompetentecon de la naciŝtatoj.

Kontraŭ tiuj problemoj la internaciaj organizaĵoj mem montriĝas tro ofte nekapablaj konkretigi la plej bonajn intencojn, ĝenataj de la naciŝtataj aŭ privataj interesoj por defendi la universalan pacon kaj la aferon de la homaro.

**Konfrontitaj al tiu nepoveco de la ŝtatoj kaj de ties internaciaj institucioj, ni, la Monda Popolo, devos organizi nin por aŭdigi nian voĉon, nian volon atingi la ellaboradon de pacema kaj civilizita mondo.**

Ĝuste la Kongreso de la Popoloj havas tiun mision (vd. p.2). La Kongreso de la Popoloj estas nek Monda Parlamento nek Monda Konstitucia Asembleo, sed demokrata preparstadio. La Kongreso de la Popoloj ne eldonas universalajn leĝojn, sed preparas la vojon al la starigo de monda demokratio. Ĝi estas la aperanta voĉo de la Monda Popolo kune kaj kompletige kun la multeco de la organizaĵoj de la civila socio, kiu laboras en tiu sama senco.

## Renovigitan Kongreson de la Popoloj

Kreita per sinsekvaj balotelektoj de 1969 ĝis 1998, la Kongreso de la Popoloj troviĝis konfrontitaj kun problemoj kaŭzigitaj de sia propra strukturo. Tial en 2003 la Plena Kunsido de Kongreso de la Popoloj profunde rearanĝis la ekzistan kaj funkcia manieron. Sekve vi estas alvokitaj por voĉdoni la renovigon de la dua triono de Kongreso de la Popoloj. **Vi devos elekti 15 novajn elektitajn Delegitojn por naŭjara mandato.**

La kandidatoj, kiuj estas prezentataj al vi en la sekvontaj paĝoj respondis al la alvoko al kandidatiĝo enpresita en pluraj gazetoj. Ĉiuj estas civitanoj de la mondo kaj laŭ la vidpunkto de la Balotelekta Kontrolkomisiono ĉiuj estas valoraj kandidatoj. Tamen ili havas tre diversajn devenojn, spertiĝojn, pensmanierojn kaj celojn. Al vi apartenas elekti el inter ili.

La « nova » Kongreso de la Popoloj aspektos tiel, kiel vi decidis, kaj havos la legitimecon kaj la efikecon, kiun vi donos al ĝi. Tial gravas, ke vi faru kaj esprimu vian elekton. Tio estas civitana devo ; tio estas neceseco por la progreso de la monda demokratio.

*La Balotelekta Kontrolkomisiono  
de la Kongreso de la Popoloj  
21an de junio 2010.*

Por kompletigaj informoj :

<http://www.recim.org/kdp/kdpopoloj.htm>

Mondcivitana Registrolibro, 66 bd Vincent Auriol, 75013 PARIS

[abc@recim.org](mailto:abc@recim.org)

## Kiel voĉdoni ?

### Vi ricevis

En la granda blonda koverto :

⇒ tiun kajeron de la kandidatoj, kun 12 paĝoj, konsistantan el tiuj du klarigaj paĝoj kaj el 10 paĝoj por prezenti la kandidatojn al balotelektoj. Ili estas 20 kandidatoj. Ĉiu kandidato estas prezentita sur unu duona paĝo.

⇒ blankan koverton kun ordinara formato, nomitan « post-responda » validan en ĉiuj landoj de la mondo (Reglamento de la Universala Poŝta Unuiĝo).

⇒ verdan koverton kun malgranda formato.

⇒ balotilon entenantan la nomojn de la 20 kandidatoj.

### Vi elektu ĝis 15 nomojn.

El inter la 20 prezentitaj kandidatoj, vi elektu maksimume 15.

**T** Vi transskribu viajn elektojn sur la balotilon per krucoj en la tiucele preparitajn kvadratojn.

### Vi sendu vian balotilon

1. Vi faldu la balotilon kaj enŝovu ĝin en la malgrandan verdan koverton ;
2. vi enŝovu tiun verdan koverton en la blankan « post-respondan » koverton ;
3. vi malgluu la protektan bendon de la post-responda koverto kaj vi fermu ĝin.
4. Vi enpoŝtigu tiun koverton *sen poŝtmarko*.

#### Notinde :

- a) la blankaj post-respondaj kovertoj estos malfermitaj nur la 21an de septembro 2010, dum la balotelekta voĉnombrado.
- b) por esti valida, via balotilo devas ricevi nur la krucojn, kiuj esprimas vian elekton. Maksimume : 15 krucoj. Neniu skribaĵo estos tolerata.
- c) La verda koverto devas enhavi nur la balotilon. Tamen kun la verda koverto, vi povas enŝovi en la postrespondan koverton leteron ĝis la maksimuma pezo de 20 gramoj.
- d) La literoj (de A ĝis T) estas markoj donitaj al la kandidatoj laŭ la dato de ricevo de ilia dosiero fare de la Balotelekta Kontrolkomisiono. Tiuj literoj estas destinitaj plisimpligi la voĉnombradon.
- e) La kontrakto de post-respondado, subskribita inter Mondcivitana Registrolibro kaj la franca Poŝto validos nur dum la balotelektoj al la Kongreso de la Popoloj.

**Ne atendu !**

## La ĉefaj taskoj, kiuj estis difinitaj ĉe la KONGRESO DE LA POPOLOJ estas jenaj :

- Starigi la inventaron de la fundamentaj bezonoj, komunaj al ĉiuj homoj.
- Proklami la neceson de publikaj tutmondaj institucioj kapablaj kontentigi tiujn bezonojn.
- Difini :
  1. sur kiuj terenoj estas necesa la interveno de publika tutmonda institucio ;
  2. kiuj transdonoj de kompetenteco profite al la publikaj tutmondaj institucioj, devos esti konsentitaj de la naci-ŝtatoj ;
  3. la procedurojn necesajn por la kreado de publikaj tutmondaj institucioj ;
  4. la strukturon de kreota tutmonda supernacia federacia aŭtoritato.
- Esprimi per mondaj deklaroj la opinion aŭ volon de la tutmonda popolo pri la eventoj koncernantaj la sorton de la homaro.
- Intervenii ĉe la registaroj aŭ la internaciaj instancoj pri la aktualaj mondproblemoj.
- Pristudi la raportojn de fakuloj pri la projektoj de tutmonda institucio kaj esprimi sian opinion.
- Prezenti antaŭprojekton de tutmonda federacia konstitucio al la naciaj registaroj kaj parlamentoj, kaj al la diversaj internaciaj instancoj.
- Ĉiel iniciati utile al la ekfunkciigo de demokrata monda parlamento, konsistanta ia. el Ĉambro de la tutmonda popolo.
- Celi la kunlaboradon kaj la kreadon de edukaj, informaj kaj kulturaj organismoj, favorantaj al ekkonsciigon pri universala solidareco.

## Ĉe financoj :

### La voĉdonado por la Kongreso de la Popoloj estas senpaga.

La voĉdonrajto estas submetita je neniu antaŭa devigo de kotizo aŭ de iu ajn kontribuo. Ĉiu voĉdonanto disponas por la resendo de sia balotilo « post-respondan » koverton sen afranko.

**Tamen**, oni scias tion, nenio estas reale senpaga : papero, kovertoj, presado, multnombra dissendado, kosto de la ricevitaj post-respondiloj, t.e. por tiu balotelektado suma elspezo de 7 000 €.

... kaj necesos rekomenci almenaŭ laŭ la sama buĝeto post tri jaroj, kaj post ses jaroj.

... ankaŭ necesos por la elektitoj funkcia buĝeto : kosto de la kunvenoj, de la protokoloj, de la necesaj intervenoj, de la pledado ĉe la ŝtatoj kaj internaciaj institucioj ...

Pli ol antaŭe Mondcivitana Registrolibro invitas ĉiun pagi memvolan jaran kontribuon ekvivalentan al duona tago de enspezoj, por ke niaj organizaĵoj povu efike plenumi siajn rolojn,

? Aŭ al via Registrocenro

? aŭ al : CITOYENS DU MONDE : CCP PARIS 2848 94 Y

**IBAN : FR 10 2004 1000 0102 8489 4Y02 027** - Bank Identifier Code : PSSTFRPPPAR

? aŭ per banka karto pere de **PayPal** ekde la retejo [www.recim.org](http://www.recim.org)

- Ni akceptas la ĉekojn en Eŭroj eldonitajn sur francaj bankoj.
- Por la aliaj landoj aŭ la aliaj monunuoj, necesas preferi la internacian poŝtan mandaton aŭ la interbankan ĝiron entenantan la ĉi-supran kodon **IBAN**, aŭ la pagon per **PayPal** ekde la ttt-ejo [www.recim.org/cdm/](http://www.recim.org/cdm/).
- Ni akceptas la bankajn monbiletojn (konverteblaj aŭ ne) protektitajn per kolora aŭ karbona papero, kaj metitajn en la post-respondan koverton, sed tute ne en la verda koverto « Balotelektoj ».

## La kreaĵoj de la Kongreso de la Popoloj

- **Ä Instituto por Tutmondismaj Studoj** (1977) IEM esplora kaj kultura organizo kun tutmondista perspektivo.  
⇒ IEM-AIGS, rue Vert-Vinâve 60, BE 4041 VOTTEM (Belgio)
- **Ä Tutmondista Gazetagestejo** (1980) : AMIP . kiu regule aŭ okaze disdonas al la gazetagestejoj kaj amaskomunikiloj la informojn el la Kongreso de la Popoloj aŭ artikolon diskonigantan tutmondistan opinion pri aktualaĵo.
- **Ä Monda Solidareco kontraŭ la Malsato** (1982) : (MSM) kiu celas la starigon de tutmonda institucio de Solidareco, konkrete laborante kiel transnacia mutuala asocio, ĉeestanta en 32 landoj.  
⇒ [www.globidar.org](http://www.globidar.org) - [info@globidar.org](mailto:info@globidar.org)  
⇒ MSM/SMF, 1 ruelle Haute, FR 21120 GEMEAUX (Francio).
- **Ä Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj** (2004) / ASKOP Konsistanta el aliĝintaj organizaĵoj kaj el forumo da individuoj, ASKOP estas organizaĵo por partoprena demokratio rilata al la problemoj kun tutmonda intereso.  
⇒ [www.recim.org/ascop/agenda-eo.htm](http://www.recim.org/ascop/agenda-eo.htm)  
⇒ ASCOP, ĉe Alain BAL, 16 rue de Belleneuve, 21270 Binges FR
- **Ä Jura Registroservo** (2006) (JRS) kreita por legalizi la statutojn, sindevontigojn kaj kontraktojn de transnaciaj organizaĵoj, kiuj deziras sin meti en la perspektivo de monda civila juro.  
⇒ [www.recim.org/civil/](http://www.recim.org/civil/)

*Kunvenoj, laborgrupoj, deklarioj, sindeklaroj, kunlaborado kun ĉiuj organizaĵoj kaj kolektivoj da organizaĵoj zorgantaj pri la estonteco de la homaro kaj de la planedo, protektado de la minoritatoj, defendo de la homaj rajtoj, pledado ĉe la ŝtatoj, ĉe internaciaj institucioj, plifirmigo de monda juro, starigo de novaj institucioj...*

*Ĉion la Kongreso de la Popoloj faros kun vi kaj je via nomo. Multaj aferoj jam estas faritaj, sed restas ankoraŭ pli multe por fari.*



# Rasmus TENBERGEN

# A

Nask. en 1971  
Mondcivitana legitimkarto n-ro :24784  
loĝanta en Alfter (Germanio)  
tenbergen@world-democracy.org

## Biografio

D-ro Rasmus Tenbergen estas Plenuma Direktoro de IFLD (Instituto pro Klerigo de Gvidontoj) <http://www.ifld.de> kaj de Monda Parlamenta Eksperimento (<http://www.world-parliament.org/>). Li studadis politikan sciencon kaj regadon en la libera Universitato de Berlin (Germanio) kaj en la Universitato de Harvard (Usono), fakiĝinte pri internaciaj traktadoj kaj rilatoj. De 1996 ĝis 1997 li estis kunelektita de la eksa germana kanceliero Helmut Kohl al la Centra Komitato de la reganta partio (CDU) en Germanio. De la jaro 2000 li disdonis kursojn de intertraktado kaj de gvideco en la universitatoj de Bonn kaj de Erfurt.

## Deklaro de intencoj

Dum diskuto sur elektronika forumo de la Mondcivitanoj mi estis invitita prezenti mian kandidatecon al la Kongreso de la Popoloj. Mi fieras fari tion, ĉar Kongreso de la Popoloj havas grandegan kapablon : laŭ mia opinio ĝi povas funkcii kiel " provizora monda parlamento " je baza nivelo kaj tio estas laŭ mi la plej bona maniero per kiu necesus plani la kreadon de monda parlamento. Mi opinias, ke estas tre

taŭge, ebligi al la registritaj mond-civitanoj doni al aliaj mond-civitanoj la mandaton reprezenti ilin, kunordigi iliajn klopodojn kaj interagadi kun la cetera mondo. Similan klopodon mi provis apliki kadre de la projekto, kiun mi iniciatis en la jaro 2000 : la eksperimentado de monda parlamento ([www.world-parliament.org](http://www.world-parliament.org)), antaŭe konita kiel eksperimenta projekto de monda demokratio ([www.tdge.org](http://www.tdge.org)), " monda parlamento " funkcia sur Interreto.

Dua rimarkenda aspekto estas la kunlaborado inter la diversaj iniciatoj de internacia aŭ monda demokratio. De la jaro 2003 mi estas kun-iniciatinto de la klopodoj de formado de koalicio (vd <http://www.world-democracy.org>), kaj ankaŭ en tiu kampo la Kongreso de la Popoloj havas la necesan kapablon por faciligi la kunlaboradon dank'al la rajteco akirita per balotelektoj bazitaj sur la principo de unu homo, unu voĉo. Tio ne signifas, ke mi konsideras la Kongreson de la Popoloj kiel la sola kaj unika organizaĵo kapabla utili kiel ŝirmilo, sed ĝi certe povas helpi en la kunordigado de la diversaj konstruaj iniciatoj.

Se vi deziras ricevi pli da informoj, mi petas vin viziti mian interretan ttt-paĝon : [www.rasmus.tenbergen.de](http://www.rasmus.tenbergen.de)



# Karl KPODO

# B

Nask. en 1955  
Mondcivitana legitimkarto n-ro :183125  
loĝanta en Akro (Ganao)

[karlkpodo@yahoo.com](mailto:karlkpodo@yahoo.com)

## Biografio

- Prezidanto de la Ganaa Mondcivitana Registrocentro
- Ĝenerala Sekretario de la Mondcivitana Registrolibro
- Organizinto de la Seminario de Tutmondismaj Studoj en Akro en novembro 2008
- Iniciatinto de la Afrika Demokrata Konsilio

## Programo

Mia akcepto en la Kongreson de la Popoloj nepre ebligas al mi multe pli daŭrigi mian partoprenon en la agado al la realigado de la valoraj celoj, kiujn mi taskis al mi por la servo de homaro. Mi estas ankaŭ tre konscia, ke mi ne povas atingi tiujn celojn sola, ĉar neniu homo sur la tero estas mem insulo.

Inter la Tutmondistoj sine de la Kongreso de la Popoloj estas tre gravaj personoj, kiuj havos rolon en miaj provoj. Aliĝi al ili kiel kunlaboranto ebligas

plibonigi la ideojn kaj projektojn.

Per tiu teksto mi alvokas ĉiujn, ĉu proksimajn, ĉu malproksimajn, kiuj vere interesiĝas pri la plibonigo de Afriko kaj de la tuta mondo subteni miajn iniciatojn. La Afrika Demokrata Konsilio kunlaboros plene kun aliaj organizaĵoj por homaj rajtoj, kiel " Agadi por Homaj Rajtoj ", Human Rights Watch, Transparency Internacional, kaj multaj aliaj.

Al vi, kiu balotelektos, mi diras " *Vi estas la reala profitonto de miaj elkoraj deziroj. Vi ludu vian rolon, kaj tio nunas ! Elektu Karl Kpodo en la Kongreson ! Elektu min, la tutmondista aktivulo, je la taŭga loko, kiu estos mia !* ".



# Josep ORTEGA

# C

Nask. en 1954  
Mondcivitana legitimkarto n-ro :024595  
loĝanta en SANT JULIA DE LORIA (Andoro)

jllortega@gmail.com

## Biografio

De longa tempo mi sentas min civitano de la mondo. Dum pluraj jaroj mi agadis por la efektivigo de projektoj, kiuj provis kunigi la diversajn movadojn kaj organizaĵojn tiam ekzistantajn. Mi provis aliĝi en ĉiuj organizaĵoj, kiuj havas saman vidon pri mond-civitaneco kaj pri monda demokrata regeco, kaj dum kelka tempo mi antaŭenpuŝis la Mondcivitanan Komunumon (CWC). Mi daŭre estas membro de kelkaj el ili, sed bedaŭrinde ili ne ŝajnas esti tro agemaj. Mi organizis la unuan virtualan Kongreson pri mond-civitaneco kaj pri monda demokrata regeco.

Pli freŝdate mi iniciatis la " Ondon ", kiel novan strebon por diskonigi la bazajn mond-civitanajn ideojn.

## Deklaro de intencoj

Mi opinias, ke la strebado de la Mondcivitanoj ne estas en ties plej favora momento, kaj ke ĝi devas fronti lavangon da politika protektismo kaj da limiga naciismo

Ni bezonas, ni konstante bezonas unuigi niajn fortojn, kaj agadi laŭ pli kunordigita maniero, por aŭdigi nian voĉon en la politika areno je ĉiuj niveloj far vasta publiko.

La Kongreso de la Popoloj povas esti utila en tiu strebado, kaj por helpi ĝin en tiu senco, mi prezentas mian kandidatigon.



# Tahar HOUHOU

# D

Nask. en 1961  
Mondcivitana legitimkarto n-ro179305 :  
loĝanta en Vaulx en Velin (Francio)

thouhou@free.fr

## Biografio

Asocia aktiveco

Administranto de asocioj, Interreto, volontulo kun handikapuloj, aktiva civitano.

Humanista aktivulo sine de diversaj lokaj kaj internaciaj strukturoj. Animanto ĉe Radio-Canut. Mi estis administranto de " CCO " en Villeurbanne dum 5 jaroj kaj tial mi okupiĝis memvole pri la akceptado de eksterlandaj delegacioj. Administranto dum 4 jaroj de la Sociala centro Georges Levy en Vaulx-en-Velin, kie mi prilaboris la solidarecajn dosierojn " Nikaragvo, Palestino ".

Administranto dum 4 jaroj de la Sociala centro de Buers, kie mi laboris pri la realigo de ĉarto por la Aktiva centro en web-2, kun personaj paĝoj kaj en Facebook, kie laŭ eble mi provas konsciigi la interretulojn pri humanismo, paco kaj justico. Aktiva civitano de mia komunumo, mi partoprenis en multaj renkontoj pri la problemoj de transporto, kaj sur tutlanda nivelo, mi kontribuis en laborgrupo, kiu pripensis proponojn por alternativaj solvoj al la problemo pri transporto.

Ĉiun jaron kaj memvole, mi kadrans mensajn handikapulojn dum eksterlandaj vojaĝoj, kio estas por mi okazo por renkonti alilandajn civitanojn kaj paroli pri monda civitaneco. De unu jaro, dank'al Facebook, mi rekomencis aktivan servon sine de la

movado de la Civitanoj de la Mondo kvankam neniam ĉesinte miajn agadojn per verkado de multaj artikoloj pri la temo kaj igante multajn konatulojn enregistriĝi ĉe Mondcivitana Registrolibro.

Mi partoprenis en kvar sesioj de Instituto de Tutmondismaj Studoj ; dum tri jaroj mi estis administranto de Mondcivitana Registrolibro, mi ankaŭ partoprenis en agado de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato.

Mi estas civitano de la mondo registrita en 1989

Depost 2008 mi estas tre aktiva pri Palestino, kie mi provas kun aliaj konsciigi la Francojn pri la Palestina dramo kunlabore kun judaj organizaĵoj en Francio kaj Israelo, kun kiuj ni provas antaŭenpuŝi la aferon por justa kaj daŭra paco.

## Deklaro de intencoj

Mi deziras evoluigi la koncepton de monda civitaneco sine de la araba medio, plibonigi la rilatojn en Francio inter la diversaj komunumoj, helpi ekkompreni la aferon " Palestino " je justica nivelo, batali kontraŭ ĉiuj formoj de rasismo kaj de diskriminacio kaj ankaŭ helpi plibonigi la komunikadon sine de la tutmondistaj instancoj.

Mi opinias, ke se mi sukcesas antaŭenpuŝi tiun projekton dum tiuj naŭ jaroj, tio estigos al mi grandan kontentigon.



# Mourad BEN JOMAA

# E

Nask. en 1972  
Mondcivitana legitimkarto n-ro :184703  
loĝanta enJebeniana (Tunizio)

mouradbenjoomaa@yahoo.fr

## Kion mi faris

- Starigi kontaktojn kaj korespondojn kun iuj Civitanoj de la Mondo por interŝanĝo de ideoj ;
- Komuniki kun S-ro Bernard Muet la informojn kaj la aktivecojn de lia regiono pri monda civitaneco
- Publikiti eltiraĵon de artikolo pri tutmondismo en la bultenoj de la Mondcivitanoj sub la kunordigo de S-ro Joël Luguern,
- Paroli pri monda civitaneco por diskonigi la principojn de tutmondismo kaj varbi novajn civitanojn de la mondo.

## Se mi estos elektita, mi provos

- Esti je la dispono de ĉiuj tutmondismaj aktivecoj, ĉiuj koncernataj asocioj por ĉia teknika helpo je nivelo : esplorado/klerigo/ edukado, IEC ... manifestacioj/movadoj.
- Diskonigi la Kongreson de la Popoloj, ties pravigon, labormetodojn, misiojn, historion ;
- Antaŭenpuŝi la rilatojn inter la Delegitoj, preferante la interŝanĝojn inter la Delegitoj,
- Diagnozi la problemojn, kiuj minacas la ekziston de homo sur tero
- Antaŭenpuŝi la mondan demokration : koncepto kaj konduto
- Lukti kontraŭ ĉiuj danĝeroj, kiuj minacas la teron
- Publikigi propagandajn artikolojn en la bultenoj de la Civitanoj de la Mondo pri la regado de la planedo.



# Adriano CICCIONI

# F

Nask. en 1940  
Mondcivitana legitimkarto n-ro :184581  
loĝanta en Milano (Italio)

adrianociccioni@hotmail.com

## Biografio

Mi estas tre fiera pro mia legitimkarto de Civitano de la Mondo. Temas pri la normala maniero por min prezenti.

Mia profunda aliĝo al la transnacieco multe grandiĝis tra multajn kaj definitivajn vivspertojn.

Fuĝinte el Fiume, nun nomita Rijeka, kie okazis la amasbuĉadoj de Foibe, mi dum infanaĝo jam devis taksi la hororojn kaj la funebrojn de la etna milito. Mi ne fariĝis naciisto kiu nutros sian historian vengemon sed tute male neperfortema opozicianto kontraŭ la militajn elspezojn, por la paco per malarmado.

Mi venkigis la protestojn en Italio kontraŭ la elektraj atomcentraloj. Mi ankaŭ kontribuis en la kresko de la " Ligo por la alternativaj energioj ".

Tiu lukto estis por mi kontraŭnuklea sperto tre utila, kiun mi volonte disponibos al la bazaj movadoj en la preciza momento kiam la nuklea lobio (civila kaj militara) provos levi la kapon en Italio kaj en la tuta mondo.

## Deklaro de intencoj

Mi decidis proponi min por evoluigi, en la monda parlamento, la transnaciajn " punktojn ", tiujn por kiuj mi dediĉas mian tempon en la asocioj, kiuj kiuj mi kunlaboras de

jardekoj.

1. La eliro el la civila kaj militara nuklea industrio, ĉar la nuklea teknologio staras kiel plej grava minaco por la pluvivo de la homa speco,
  2. La alternativo de energia elekto fondita sur renovigeblaj fontoj, memorante ke la afero koncernas la duonon de la ekonomia aktiveco, kaj tiel celante efiki kontraŭ la klimata varmiĝo.
  3. forlasi la profitekonomion por iri al la kontentigo de la homaj fundamentaj bezonoj. Aparte mi ŝatus apliki la recepton de " sesopa R " je la nivelo de la ĝenerala ekonomia politiko, t.e. :
    - Rearanĝi la proprietojn kaj la kolektivajn servojn
    - Redistribui (la enspezaron laŭ egalitara senco)
    - Reloki (produkti en areo taŭge limigita)
    - Rilatiĝi (fondi retan ligon inter homoj, laboro kaj produktoj)
    - Redukti (la konsumadon de materialoj kaj de energio)
    - Readapti la nocajn kaj militarajn produktokapablojn
- Tiuj kolektivaj akiroj devas sin nutri de individuaj agadoj, kiuj estas resumeblaj per " kvinopa R " : Redukti, Reutiligi, Ripari, Recikli, Rekvietigi

Kiel Civitano de la Mondo, mi ŝatus rememorigi al ĉiuj, ke ni ricevis la planedon pruntedone de la venontaj generacioj, sed ankaŭ, ke kiel lokaj komunumoj, ni estas nur la gardantoj de la teritorioj pro la tuta homaro.



# Stevens CHELLUM

# G

Nask. en 1952  
Mondcivitana legitimkarto n-ro : 176496  
loĝanta en Creteil (Francio)

## Biografio

Naskiginte en 1952 en Maŭricio el modesta familio de 10 gefiloj : 7 knabinoj kaj 3 knaboj el kiuj mi estas la 8a.

Ĉar en Maŭricio la duagradaĵaj studoj estas pagataj, je 12a jaraĝo mi devis komenci etajn laborojn por pagi miajn lenejajn necesojn tiajn, kiaj ĝardenado, bredado de kokidoj kaj de kuniklidoj por la vendado kaj nia konsumado, kaj ĉefe la fabrikado de lignokarbo.

Je 19a mi jam havas abituriantan ekzamenon kun plia unu universitata jaro (pri publika sano kaj civila geniarto). Tiam iu direktoro de gimnazio (pli ol 1500 lernantoj) proponis al mi postenon kiel profesoro pri matematiko kaj angla, dum mi ankoraŭ ne esti plenkreska (majoritato je 21a). Mi profitis el la okazo. Post unu jaro, post la sukceso de mia ekzameno en la fakultato, li nomis mi fakestro pri matematiko, arkitektura kaj industria desegno kaj responsanto de ĉiuj manlaborejoj.

Mi estis direktoro de la Hejmo de la Junaj Laboristoj en Valenco (Francio). En Parizo, Ĝenerala Direktoro de unu el la plej gravaj socialaj centroj (Parizo 15a), kun infanvartejo kaj pli ol 300 aktivecoj. Nun mi estas

kontrakta Konsilanto pri Edukado en la Akademio de Creteil.

Mi estis terano antaŭ ol koni la Civitanojn de la Mondo

## Deklaro de intencoj

*Ja mi povas kaj mi faros  
ĉar mi havas revon.*

Sola oni povas nenion fari. Mi iros ĝis fino de miaj revoj por ke la riveretoj, la asocioj kaj la volontuloj, kiuj rondiras ĉirkaŭ la civitanoj de la mondo, kunfluu en grandan riveron, kiu abunde fluos al la Civitanoj de la Mondo. Se oni volas helpi tiun mondo, ni kunpremu la manojn por kune antaŭeniri, sen batalo pri titolo.

Mi deziras fari ke ĉiuj volonta Civitano de la Mondo ricevu respondecon, interalie pri informado. Sekve de la decido farita en Braziljo, mi deziras labori en la nova ekflugo de la Informagentejo (\*).

Ĉiun tagon mi laboras por ke la volo de Guy kaj Renée Marchand ne estu forgesita. Kun ni konstruu la mondan civitanecon. Ne estas kialo, ke tio ne funkcios.



# Khemisti BECHAIRIA

# H

Nask. en 1964  
Mondcivitana legitimkarto n-ro :183863  
loĝanta en Souk Ahras (Alĝerio)  
bkhemisti1@yahoo.fr

## Biografia resumo

En la flughaveno Heathrow, Londono, en 1985, mi legis en franclingva revuo la tutmondisman terminon " Civitano de la Mondo). Post kelkaj tagoj mi kontaktis la oficejon en Parizo kaj mi ricevis ĉiujn dokumentojn pri la organizaĵo de Mondcivitana Registrolibro kaj poste mi hezitis en unua tempo, ĉar la lando travivis konflikton. Mi timis esti ankaŭ celata de la krima politika reĝimo kaj mi ĉion kaŝis. Tio daŭris inter 1987 kaj 2003 kiam mi relanĉis mian projekton por fariĝi efika elemento sine de tiu organizaĵo je internacia nivelo kaj mi tre fieras pri tio ĉefe kiam mi ricevis la legitimkarton de Civitano de la Mondo.

Mi havis grandan kuraĝon kaj forton por komenci la batalon kontraŭ la politika kaj administra anarkio kaj ĉiuj specoj de burokratio kaj mi staris kontraŭ la negativaj spiritoj, kiuj minacas la homajn animon kaj moralon kaj kiuj utiligas kiel detruaj iloj la poluadon, la internan militon, la malsaton, la klimatan plivarmiĝon, ktp. Ĉio kun mia partopreno en multaj debatoj, ĉu je landa aŭ internacia nivelo, per elektronika aŭ posta korespondado

kun miaj tutmondismaj samideanoj kaj mi profitis el oportuno de la politikaj paroladoj kaj de la konferencoj kun kelkaj kunlaborantoj sine de multaj kulturaj kaj socialaj asocioj en Alĝero kaj tra la tuta Alĝeria lando. Mi provis ĉeesti en la internaciaj kunvenoj de Mondcivitana Registrolibro, sed la problemoj de vizo malhelpis min.



# Claudius SCHAUFFLER

# I

Nask. en 1923  
Mondcivitana legitimkarto n-ro 14062:  
loĝanta en Steffisburg (Svisio)

claudius.schauffler@ch-weltbuenger.org

## Biografia resumo

Mi estas aktiva Civitano de la Mondo ekde 1951, unue en Germanio.

En Germanio mi partopreni en la fondado de la organizaĵo Civitanoj de la Mondo. Ĉar mi estas profesoro ce Muzika Akademio en Baselo mi ricevis la svisan civitanan rajton en 1983. Ekde la 8an de majo 1997 mi estas prezidanto de la Svisaj Mondcivitanoj. De la 17a ĝis la 21a de junio 1995 mi partoprenis en " World Citizens Assembly " en Sanfrancisko. Krome, mi reprezentis la Svisajn Mondcivitanajn en la " Internacia Konferenco de la Civitanoj por la Paco " en Hago (Nederlando) kun prezenta budo. Tiu konferenco okazis de la 11a ĝis la 15a de majo 1999. Dum multaj jaroj mi ĉiam veturis al Parizo por partopreni en la kunvenoj de la Administra Konsilantaro de Mondcivitana Registrolibro. La 16an de aprilo 2004 mi estis akceptita kiel honora gasto de la urbestro de la mond-civitana urbo Chelles, Jean-Paul Planchou, kune kun membroj de nia komitato Michael Ehinger kaj Eva Irmann. En Svisio mi estas en kontakto kun ĉiuj parlamentanoj. Nia organizaĵo estas prie bone

konata ĉe la svisa parlamento.

## Deklaro de intencoj

Mi defendas la universalajn homajn rajtojn, kiuj devus esti rekonitaj kiel bazo de deviga jura ordo supernacia por ĉiuj popoloj. Interalie mi devontigas min por la bonfarto de inoj, viroj kaj infanoj, kiuj rajtas pri sufiĉa nutraĵo, pri trinkakvo kaj pri lerneja instruado. Mi apogas, ke oni prenu iniciatojn por la efektivigo de demokrata Monda Parlamento entenonta interalie Ĉambron de la Monda Popolo. Mi postulas la forigo de ĉiaj diktaturoj kaj la fondadon de Monda Demokratio bazita sur la federaciismo, en kiu la nacioj partoprenas, sed en kiu ili devas limigi sian suverenecon favore al monda juro. Kiel membro de la Verda partio en Svisio mi devontigas min por la protektado de la loka kaj monda naturo. Sur tiu bazo eblas al mi diskonigi la fondadon de Monda Aŭtoritato de la Maroj.



# Amokrane ABDELLI

# J

Nask. en 1978  
Mondcivitana legitimkarto n-ro :  
loĝanta en à Tazmalt, Bejaïa (Alĝerio)  
abdelli78@yahoo.fr

## Memprezento

Projektestro (helpo al la asocia movado de la Alĝeria sudo, klerigo de la asociaj membroj). Fondaĵo Ebert-Alĝerio ; membro (Pac-ambasadoro) de la Federacio por la Universala Paco ; membro de la Alĝeria reto de la volontaj junuloj, Fondaĵo Ebert-Alĝerio ; Membro de asocio de sangodonantoj ; Membro de la alĝeria asocio por la prevento de la junularo, dum du jaroj.

- **Seminarioj :**
- La balotelektoj, ilo de demokrata ŝanĝo. Barcelono, Hispanio.
- Moderigo kaj prezento de projekto, Alĝero, Alĝerio
- Komunikado kaj regado de la konfliktoj, Alĝero, Alĝerio
- Gvidanteco kaj socia komunikado, Tizi Ouzou, Alĝerio
- Ellaborado kaj prezentado de projektoj, Souk Ahras, Alĝerio

## Deklaro de intencoj

Konscia pri miaj respondecoj kiel civitano de la mondo, kaj fronte al la alarmiga situacio, kiuj travivas nia planedo : difektiĝo de la homaj rajtoj, malpliigo de la humana helpo, manko de solidareco kaj fronte al la gravaj problemoj, kiel la naturaj katastrofoj, militoj kaj konfliktoj, mi prezentas min kiel civitano de la mondo memdevontigita favore al la humanaj aferoj. Mi volas kunlabori kun la civitanoj de la mondo favore al pli efika Kongreso de la Popoloj kaj por ke

la agado de Delegito estu pli pragmatisma kaj pli racia. Se mi havos la ŝancon esti elektita al la Kongreso de la Popoloj mi volas labori por :

- Plifortigi la kapablojn de la Mondcivitanaj delegacioj sin apogante sur la Interretaj retoj, kiel Facebook, Twitter, ktp. kaj kiel moderiganto kaj Mondcivitana Delegito en Alĝerio mi konstatis, ke la dissendado de la informoj tra la sociaj retejoj estas pli efika.
- Labori kune kun la aliaj delegacioj kaj lanci la ĉeno de la humaneco tra la mondo : iniciato, kiu sendube ebligos ĉeesti ĉiun operacion de solidareco, operacion de humana helpo.
- Revigligi la Mondcivitanajn Registrocentrojn en ĉiu urbo, ĉiu komunumo, kvartalo, kaj kunlabori kun la aliaj asocioj, NRO, inviti ilin fariĝi Civitanoj de la mondo por igi iliajn lokajn agadojn pli efikaj.
- Labori por konsciigi pri la ideoj de monda civitaneco kaj por ke la monda civitaneco estu la spegulo de la loka civitaneco.
- Labori kun la mond-civitanaj deputitoj por doni efikecon al la Kongreso de la Popoloj per partopreno kaj aranĝo de renkontoj, klerigaj laborgrupoj en ĉiuj punktoj de la planedo kaj labori pri la lanĉo de donitaĵaro por ke la cirkulado de la informado pri la aktivecoj de la reprezentantoj kaj de la asocioj kaj NRO filiiĝintaj de Kongreso de la Popoloj estu pli rapida kaj pli efika.



# Giang NGUYEN

# K

Nask. en 1983  
Mondcivitana legitimkarto n-ro :183801  
loĝanta en Vjetnamo

kgiang47@gmail.com

## Biografio

Mi naskiĝis en Vjetnamo la 4an de julio 1983. Mi faris ĉiun miajn duagradajn studojn en Danang en Vjetnamo. Mi alvenis en Francion en 2002 por fari superajn studojn.

Post kvin jaroj mi havigis al mi " Master-diplomon " en 2007. Poste mi laboris en franca entrepreno de 2008 ĝis la komenco de 2010.

Finde de la jaro 2002 Vjetnama amikino loĝanta en Francio proponis al mi helpi en la pretigo de la dissendado de la trimonata bulteno al la Mondcivitanoj de la Franca Registrocetro. Tiamaniere mi ekkonis la Mondcivitanojn kaj la tutmondisman. Mi akiris mian mond-civitanan legitimkarton en 2003. Poste, de septembro 2003 ĝis februaro 2010 mi plenumis la administran sekretariaton de la franca Registrocetro (krom de majo 2006 ĝis aprilo 2007).

En februaro 2010, mi reiris en mian landon, ĉar mi deziras labori en Sudorienta Azio.

Plie de miaj aktivecoj por tutmondismo, mi aktivas sine de la kolektivo " Vietnamo-dioksino ".(oranĝa agilo). Fakte la dioksino disŝprucita sur Vjetnamo dum la usona milito, estigas viktimojn ankoraŭ nun. Multe da infanoj naskiĝas misformite pro la filtrigo de la dioksino en la tero.

## Deklaro de intencoj

Dum mia restado en Francio, mi konstatis, ke multaj junuloj ne opinias utile, akiri mond-civitanan legitimkarton, ĉar laŭ ili " mi jam estas fakte civitano de la mondo. Al kio utilas posedi karton , " . foje mi sukcesas konvinki ilin per klarigo, ke akiri mond-civitanan legitimkarton estas konkreta sindevontigo, ĉar ĝi ebligas voĉdoni al la balotelektoj al la Kongreso de la Popoloj.

Mia celo estas diskonigi tutmondisman al la junuloj en Sudorienta Azio, ĉar en tiu monda regiono ili ankoraŭ ne konsideras sin kiel civitanojn de la mondo. Mi dezirus montri al ili, ke la tutmondismo estas la politika formo de estonteco por respondi al la problemoj, kiuj estas je planeda skalo kaj ke Sudorienta Azio, same kiel ĉiuj mondaj regionoj, jam estas et certe estos koncernata de tiuj mondaj problemoj, ke ĉiuj popoloj en la mondo devas esti reprezentitaj en la Kongreso de la Popoloj do ankaŭ tiuj de Sudorienta Azio, ĉar ankaŭ ili havas sian esprimdevon kaj iliaj ideoj por proponi harmonian vivon sur nia tero. Fine, se mi estos elektita, kiel Delegitino, mi proponos, ke en la kadro de Monda Aŭtoritato pri Medio, la Kongreso de la Popoloj inkluzivu la malpermeson de la fabrikado kaj almenaŭ de la uzado de senfoliigiloj, ĉar 35 jarojn post la fino de la milito, post du generacioj, la kemia produkto (fabrikita ĉefe de Monsanto kaj Dow Chemical) disŝprucita sur la arbarojn de mia lando de la usona armeo ankoraŭ estigas malsanojn kaj dolorigajn homajn katastrofojn.



# Marie-Françoise LAMPERTI

# L

Mondcivitana legitimkarto n-ro : 185928  
loĝanta en Vincennes (Francio)  
agirtdshomme@yahoo.fr

## Biografio

Prezidantino de la asocio " Agadi por Homaj Rajtoj " Aktivulino por homaj rajtoj ekde pluraj jaroj, mi fondis la asocion " Agadi por Homaj Rajtoj en 2003. Tiu asocio implikiĝas en la edukado pri homaj rajtoj, en la defendo kaj la antaŭenpuŝo de la homaj rajtoj.

La asocio realigis plurajn konferencojn pri temoj tiel diversaj, kiel tiuj rilataj al la paco en la mondo aŭ la esprimlibero. Tiuj konferencoj celis konduki debatojn, interalie kontraŭdirajn, por la ellaborado de kolektiva pripenso pri la nunaj problemaroj.

La defendo de homaj rajtoj konsistis en la kunlaborado kun aliaj NRO kiel " Senlandimaj Raportistoj ", " Internacia Amnestio ", " Kristana agado kontraŭ torturo ", " Ligo de Homaj Rajtoj ", " Internacia Federacio de Homaj Rajtoj ", por denunci la malrespektojn ĉie, kie ili okazas en la mondo.

Ni ankaŭ kontribuis en la realigo de dokumenta filmo pri la ekzilita infaneco, nomita " solaj en la mondo, la ekzilita infaneco ". Realigita de Bruno-Victor Pujebet, tiu dokumenta filmo rilatas la eksterleĝan enmigron de la infanoj kaj adoleskantoj, kiuj fuĝas el siaj landoj pro mizero aŭ milito, kaj kiuj trans la landlimoj renkontas nur socialajn servojn de la akceptaj landoj aŭ pli malbone la tribunalojn. AHR kunlaboris kun la produktisto kiel konsilanto koncerne la konvencio de Infanaj Rajtoj.

ASKOP-ano jam de tri jaroj, la asocio implikiĝis dum la 60a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj rajtoj iniciatante kampanjon por ke esprimrajto de la popoloj ekzistu sine de Unuiĝinta Naciaro.

Persone mi estas ankaŭ vicprezidantino de la Unuiĝo de la Aŭtoroj, Realigistoj kaj Teknikistoj de kino kaj Televido (UART).

## Deklaro de intencoj

Mi deziras implikiĝi kaj kunlabori kun la Delegitoj al la Kongreso de la Popoloj por ke ekzistu esprimrajto de la popoloj sine de Unuiĝinta Naciaro. Por tio mi disponigos al la Kongreso de la Popoloj miajn esplorojn kaj la konkludojn de miaj analizoj, por ke ni povu kune evoluigi nian agadon, kies unu el la celoj estas valorigi la neceson de reformo de Unuiĝinta Naciaro. Tio estas la motora ideo de mia kandidatiĝo.

Aliflanke, mi estas preta, kiu ajn estas la projekto, kunlabori kun ĉiuj Delegitoj por ke la digno, la justico kaj la libero en la mondo ne estu vanaj vortoj.

En mia klopodo, la reale noviga projekto kuŝas en tio, ke ĝi konsideras la homajn rajtojn tra la lumo de la monda demokratio.

Por tion fari, mi devontigas min fariĝi forto de proponoj ĉe la Kongreso de la Popoloj por ke ni povu unuiĝi en komunaj projektoj je la servo de la homaro.

La Kongreso de la Popoloj reprezentas al mi tiun spacon de espero kaj de konkretigo.





# Joël LABBÉ

# M

Nask. en 1952  
Mondcivitana legitimarko n-ro 180954 :  
loĝanta en Saint-Nolff (Francio)  
[mairie.st-nolff@pays-de-vannes.net](mailto:mairie.st-nolff@pays-de-vannes.net)

## Biografio

La komunumo Saint-Nolff, kun 3 750 enloĝantoj, situas en suda Bretonio apud la Golfo de Morbihan.

Municipano ekde 1977 en tiu komunumo, mi fariĝis urbestro en 1995.

## Deklaro de intencoj

En 1997, post konatiĝo kun Roger Winterhalter, tiam urbestro de Lutterbach (Alzaco) mir proponis al la municipo mem deklari per komuna decido nian komunumon "mondcivitana teritorio" per aliĝo al la ĉarto de la mondaj komunumoj.

De tiam ni ĉiam referencas al tiu aparteno, kiu nun markas nian lokan identecon kaj zorgas por respekti la spiriton de la ĉarto.

Konvinkis min pri la praveco de tiu kandidatiĝo al la Kongreso de la Popoloj denove Roger Winterhalter.

Se mi estos elektita, mi devontigos min reaktivigi kaj disvolvi la reton de la Mondcivitana Teritorioj.

### SAINT NOLFF. Prezento de la komunumo :

Komunumo kun 3750 enloĝantoj sur 2500 hektaroj, situanta je 10 km de la urbo Vannes kaj je 15 km de la rando de la Morbihana Golfo, ĝi estas unu el la 24 komunumoj de la Urbaro de Vannes-lando kaj unu el la 38 komunumoj de la estonta Regiona Natura Parko de la Morbihana Golfo.

Elektite kiel municipestro en 1995 mi deziris tuj post mia enoficiĝo en la urbodomo ellabori kun mia municipo novigan politikon bazitan sur la principo « globe pensi por loke agadi ». La loka politika projekto volas enskribiĝi en la konstruado de nova socia projekto.

La unua grava ago estis la aliĝo au la internacia reto de la « Mondcivitana Teritorioj » : en 1997 per interkonsiliĝo post multaj debatoj, la municipo deklaris la teritorion de la komunumo Saint-Nolff « monda teritorio » kaj sin devontigis respekti la devontigojn de la mondaj komunumoj : favorigi la edukadon por paco kaj por la malfermo al la mondo, respekti la vivon sur la planedo, respekti ties riĉfontojn, antaŭenpuŝi la universalajn humanajn valorojn...

Dum la sekvaj jaroj, pluraj decidoj kongruaj kun la principo de daŭra evoluigo estis faritaj : projekto de ventaj elektrogeneratoroj, dekreto kontraŭ kultivado de Genetike Modifitaj Organismoj (GMO) , antaŭenpuŝo de familia agrikulturo respekta al la ekvilibroj, ne-uzo de lignaĵo devenanta de la primaraj arbaroj, subteno al festivalo partnere kun Greepeace, ellaborado de nova politiko pri infaneco-juneco, regula organizado de konferencoj kaj debatoj pri sociaj temoj ...)

Iam, en 2003/2004, oni konstatis, ke ĉiuj ĉi apudmetitaj agadoj bezonis pri kadro ebliganta realan koherecon : la loka « Agendo 21 » plene respondis al tiu bezono de kadro. Post la interkonsiliĝo de sindevontigo en marto 2005, kaj du jaroj de pripensado, de analizo kaj de akordiĝo estis necesaj por igi la Agendon 21 operacia.

Konklude, ni konstante serĉas tra niaj decidoj la koherecon inter la tutmonda kaj la loka niveloj : nia aparteno al la reto de mond-civitana teritorioj kaj nia aliĝo al la klopodo de loka Agendo 21 ebligas redoni sencon al nia politika agado.



# Alexis BENGANTUNDU

# N

Nask. en 1954  
Mondcivitana legitimarko n-ro 183833 :  
loĝanta en Goma, Orienta/RKDongo  
[esperoab@yahoo.fr](mailto:esperoab@yahoo.fr)

## Mallonga biografio

Kongiano de RDKongo, Monda civitano ekde 2004, membro de RECI, animata per la humanaj valoroj ; la teron mi konsideras kiel mian patrujon kaj la homaro estas mia familio. Aktivulo kaj animanto pri integra disolvo kaj la homa digneco. Mi kreis asocion "Solidareco Bona Volo". Esperantisto, mi prezidas "Goma" Esperanto-Klubon. Enkadrigas orfojn kaj forlasitajn infanojn, viktimojn de militoj kiuj okazas en tiu parto.

## Deklaro de intencoj

Ni ne povas ŝanĝi la mondon. Sed povas kontribui por ties plibonigo. Devas ĉesi la esprimo " Norda-Suda rilato ". Veraj rilatoj devas ekzisti inter ni. Estanta Monda civitano, ĉar ni respondu saman defion. Nia batalo estas por la Paco kaj la Libereco. Se ĉiuj homoj estus animataj pri la Paco, nenio blokus por ke la mondo paciĝu.

Ĉio komencas ie. Tial ni devas asociiĝi por starigi ion kiu realigos la esperon de la Mondcivitanoj.

Mi estas Afrikano, jam 36 jaroj mi sekvas atente kiel

Afriko ĉiamas en la mizero. Kie ĉiam oni parloas pri malsato kaj militoj. Politika volo mankas al ni. La mizero en Afriko rezultas el la malbona administrado de la Afrikaj politikistoj subtenataj de la Okcidentaj karteloj. Apartenas al ni preni nian respondecon kaj akompani la aliajn. Levu okulon kaj diru ke ĉiu havas sian lokon kaj rolon por doni esperon al la estontaj generacioj.

Kun Solidareco Bona Volo, mi lanĉas vulgaregajn kampanjojn . Ni daŭrigu partopreni en la valorigo de la homa digneco. Kun Solidareco Bona Volo, mi devas daŭre labori serĉante mediajn problemojn kaj trovi taŭgajn solvojn al ĉiuj.

Manĝi ; alfabetiĝi kaj havi bonan sanon estas rajtoj por ĉiuj. Mi aktive devas labori en la tutmondista Kongreso por la kreado de Universalaj institucioj kie devas triumfi altruismo sub ĉiuj formoj super la egoismo ; Internacia demokrata monda reĝimo, do ekologia kaj socia Ŝtato de la planado. La vivo ne devas esti vendebla nek aĉetebla.

Mi intencas alporti plue kaj ĉiam al la aliaj. Mi adoptas la ideon de tiuj kiuj diras " Ŝanĝu la mondon per nia laboro. La ŝanĝo eblas. Tial necesas antaŭenpuŝi la Universalan demokration per la Monda civitaneco.

*originale verkita de la kandidato en Esperanto*



Nask. en 1944  
Mondcivitana legitimkarto n-ro :157750  
loĝanta en GUADALAJARA (Meksikio)  
pacoplancarte@planetafilialia.org

# Francisco PLANCARTE

O

## Mia sperto en tutmondismaj kaj homamaj aktivecoj

Mi fondis la organizaĵon Plantefalia, A.C., kiu proponas transformi UN en Tutmondan Federacion de Nacioj. Mi prelegas en diversaj forumoj, kiel en Universitato de Sapporo, la klubo Commonwealth en Sanfrancisko, la 61a kaj 62a konferencoj de DPI-NRO (UN) en Parizo kaj Meksikurbo. Mi lanĉis la alvokon por la Tutmonda Alianco por la Transformado de UN (WATUN) jam en la 25a kongreso de Mondfederaciista Movado en Ĝenevo. Mi reprezentas PAUN (Meksikio). Mi estas ankaŭ konsiliano de DWF kaj internacia vicprezidanto de "Vote World Parliament "

## Se mi estos elektita, mi intencos

Ekkonsciigi, ke ni vivas momenton de kopernika decido por transformi la ideon de absoluta nacia

suvereneco en suvereneco de homaro tra du paralelaj vojoj :

A) **La transformado de UN** en Tutmondan Federacion de Nacioj laŭ la revizebleco de la Sanfranciska Ĉarto (art. 109)

B) **la monda referendumo pri monda demokratio** kaj la triopa iniciataro, kiu estas civitana iniciato fondita sur tri mondaj leĝoj :

1. monda leĝo por ĉesigi la mondan plivarmiĝon kaj purigi la planedon
2. monda leĝo pri akvo kaj naturaj riĉofontoj por ĉiuj
3. monda leĝo por la homa digno kaj la abolicio de genocido, la ekstrema malriĉeco kaj de ĉiuj amasdetruaj armiloj.

Fine mia intenco kiel delegito al la Kongreso de la Popoloj estas instigata komune kun la aliaj civilsociaj organizaĵoj, per la evoluigo de la primara balotelekta procezo de monda parlamento, konforme kun la balotelekta procezo proponita en la dokumento titolita " Convocatoria PARMUN ".



Nask. en 1955  
Mondcivitana legitimkarto n-ro :102464  
loĝanta en Strasburgo (Francio)  
federmann.dutriez@wanadoo.fr

# Georges FEDERMANN

P

## Biografio

Judo mi naskiĝis, kuracisto mi fariĝis

Mi dediĉas mian profesion aktivecon kiel sendependa psikiatro instalité de 23 jaroj, por favorigi dignan kaj daŭran integradon de la eksterlanduloj en neregula situacio, interalie ĉiuj, kiuj estis viktimoj de psika traŭmato sekve de militaraj kaj civilaj konfliktoj, kiuj konstante damaĝas la mondon, (eksa Sovetio, Maŭritanio, Ĉadio, Ruando, Kamerunio, Angolo, Bangladeŝo, Turkio, Irako, Sirio, Georgio, Kosovo, Macedonio ...)

Tiu implikiĝo estas inspirita de la esplorado pri la aliĝado de germanaj kuracistoj al nazismo ekde 1933 kaj de la provo kompreni la kialojn, por lukti kontraŭ denovigo.

De tiam mi demandas min pri la senco de la sistema subteno de la kuracistaro al la kurantaj povoj.

Mi konsideras, ke mia kuracejo partoprenas en publika servo.

Mi adoptis la " partion de la eksterlandulo " ĉar la morala kvalito de socio kaj ties daŭro mesuriĝas laŭ la protekto, kiun ĝi povas certigi.

Socio pritraktos ses proprajn infanoj, post 10, 20 aŭ 30 jaroj sammaniere kiel ĝi pritraktas la eksterlandulojn hodiaŭ.. Tio estas socia kaj politika kriterio vere aŭgura.

## Deklaro de intencoj

Mi pretendas modeste defendi parton de la universaleco de la homa kondiĉo tra la praktiko de mia profesio kiel psikiatra kuracisto.

La konstruado de socialeco, de politiko, de solidareco kaj de frateco estas malfacila kaj ofte problema lernado, kiun mispaŝon povas endanĝerigi.

Malfacilas ankaŭ ne rebati perforton per perforto, ĉu je individua ĉu je kolektiva nivelo. Malfacile sed nepre necesa se ni deziras transdoni packulturon kaj permesi lokon kaj nomon por ĉiu en la simbola kolektiva kampo de la homaro.



# Waldo TAPIA CONTRERAS

# Q

Nask. en 1948  
Mondcivitana legitimkarto n-ro : 156781  
loĝanta en "Venezuela", Ciego de Avila (Kubo)

## Biografio

Inĝeniero. Enregistrita kiel civitano de la Mondo en 1993, poste responsanto de la Kuba Registrocentro de la Mondcivitanoj dum pluraj jaroj. Membro de " Mondcivitana Asocio " (AWC en Sanfrancisko)

Malgraŭ limaj rimedoj ni provas labori per aktiva maniero laŭ la socialaj kaj kulturaj bezonoj de nia regiono.

## Deklaro de intencoj

- Disdoni informojn pri monda civitaneco kaj pri la Kongreso de la Popoloj je monda nivelo
- Konsistigi, en latina Ameriko, grupon da mond-civitanoj dank'al kiu ni povos plifortigi la laboron laŭ la bezonoj de nia regiono.
- Kunordigi niajn aktivecojn kun aliaj regionaj kaj internaciaj organizaĵoj por antaŭenpuŝi la

agadojn en rilato kun la Kongreso de la Popoloj.

- Aranĝi regionan centron de Mondcivitana Registrolibro en Latina Ameriko ;
- Iniciati sciencajn eventojn kun sociaj kaj kulturaj organizaĵoj en rilato kun la Civitanoj de la Mondo. Inici la junularon pri monda civitaneco.
- Konsistigi grupon da Volontaj Mondcivitanoj por kunlabori en internaciaj laborejoj en la latinamerika regiono kaj en la mondo.
- Agadi por la protekto de la medio kaj por plifirmigi la mondan pacon per taŭgaj organizaĵoj, ktp.



# Claudine BESSET-LAMOINE

# R

Nask. en 1939  
Mondcivitana legitimkarto n-ro :185777  
loĝanta en Sainte-Cécile (85, Francio)  
claudine.besset-lamoine@orange.fr

## Biografio

Naskiĝinte la 16an de majo 1939 mi estas vidvino kaj patrino de tri infanoj. Mi havas nur unu nepon.

Mi estas enskribita en la Mondcivitana Registrolibro ekde 2007. Mi plenumis instruan karieron ligitan al la esplorado pri sciencoj de edukado : tio inkluzivis la kunordigadon de grupon, la kreadon de edukaj televidaj elsendoj, la partoprenon en la kreado kaj en la redaktado de esploradoj kiel ekzemple : esplorado de komparitaj sistemoj de edukado en Eŭropo.

De multaj jaroj mi membras en la Administra Konsilantaro de la Amikoj de " Monde Diplomatique " kun la organizado de diskutoj, de interŝanĝoj kaj debatoj pri plej gravaj problemoj je nacia kaj internacia nivelo.

Mi partoprenas ankaŭ en la agadoj de la Ligo de Homaj Rajtoj kiel sekcia sekretario, Regiona Konsilanto, kaj membro de la Centra Komitato.

Fine mi estas serĉanto asociita en APHE/CNRS pri frua historio

## Deklaro de intencoj

Pri la principoj : de ĉiam mi konscias aparteni al la monda komunumo kaj al la lukto por la aplikado de la Universala Deklaracio de Rajtoj de Homoj kaj Civitanoj

Pri la institucioj : la fondado de Monda Konstitucianta Asembleo ŝajnas al mi kiel unuan paŝon koncerne unu el la reguloj de interŝanĝoj inter la popoloj, t.e. la procezo de la konversacio laŭ la vorto kara al Germaine Tillon.

Fine pri mia aktiva persona kontribuo : la interŝanĝoj, la verkado, la dramaturgij procedoj kaj la teoria kaj praktika ellaborado de la juraj procedoj, kiu iras en la senco de la lpaco kaj de la interpopola kunfrateco.

Lasta vorto : plu neniu kruelaj armiloj, neniu militoj, neniu perfortoj !



# Kalima ARBOUCHE

# S

Nask. en Bejaia (Alĝerio)  
Mondcivitana legitimkarto n-ro : 187529  
loĝanta en Strasburgo (Francio) kaj en Maroko  
kalima.arbouche@gmail.com

## Biografio

Kvankam mi naskiĝis en lando longtempe konsiderita kiel regiono de Francio, mi restadis en ĝi ne multe da tempo, ĉar en Strasburgo, en Elzaco mi kreskigis al mi « radikojn ».

Mi ne povis sekvi laŭdire « normalan » akademian lernadon, tamen mi havis la ŝancon daŭrigi miajn studojn, je aĝo, kiun la maljunuloj nomas « aĝo de saĝeco kaj de transdonado » kaj malfermi min al « universo de kono kaj de kritika spirito »

De kvin jaroj mi prezidas AMESCIMOD<sup>(\*)</sup>, kaj ni estas partneroj kun asocioj en Marrakech, Ghmat, Zagora, Tissint. Surkampe mi estas tre agema kaj nun mi provas starigi " moveblan San-Karavanon " por la granda Sudo. Temas pri ia movebla hospitalo.

## Deklaro de intencoj

De kvar jaroj mi agadas en partnereco kun asocioj por la evoluigo kaj la emancipado de la loĝantaroj longtempe forlasitaj en la suda Maroko. Tiuj asocioj koncernas virinojn kaj infanojn per alfabetigo, kiel bazo de ĉiuj iliaj agadoj. Ili proponas certan nombron da " konsciiĝoj " dans la plej diversaj temoj por plifortigi la homan dignon kaj la homajn rajtojn.

En tiu agado mi planas projekton, kiu povas unuavide ŝajni utopia, tio kun la aktiva subteno de la Domo de la Mondcivitano en Mulhuzo dank'al ties prezidanto Roger Wxinterhalter, por la fondado de " Civitana kaj Solidara Domo " en Zagora. Niaj rimedoj estas sensignifaj. Tamen ni fido, nia agadmotivo sukcesos venki la malfacilaĵojn kaj la rezistojn, kiujn ni renkontas surkampe.

<sup>(\*)</sup>AMESCIMOD : Solidara Magreba-Eŭropa asocio por monda civitaneco kaj daŭra evoluigo



# Takashi AGO

# T

Nask. en 1953  
Mondcivitana legitimkarto n-ro :  
loĝanta en Kjoto (Japanio)

t-ago@oomoto.or.jp

## Kariertabelo

- 1974: Eniro al la Akademia Lernejo de Oomoto (Japana Ŝintoa Religio)
- 1978: Finiĝo de la studado en la Akademia Lernejo de Oomoto
- Aparteno al la Internacia Fako de Oomoto
- Ĝenerala Sekretario de Esperanto-Populariga Asocio (EPA)
- 1973 fariĝis esperantisto kaj membro de Mondofederalisma Movado
- 1979: delegita de Oomoto al la 64-a Universala Kongreso de Esperanto en Lucerno kaj poste rondvojaĝis en Eŭropo dum 3 monatoj.
- Ĉeestis kiel la observanto, anstataŭante s-ron ITOO Eizo en la Mondocivitana Kunveno en la kastelo "La Lambertie" organizita de s-ro Guy Marshand.
- 1979 ĝis 1995, senpaŭze partoprenis en la UK akompanante la karavanon de EPA.
- 1983,1993 organizis la 70-an kaj 80-an Japanan Kongreson de Esperanto en Kameoka kiel la ĝenerala sekretario de LKK.

- fariĝis la komitatano(c) de Universala Esperanto-Asocio.
- 2007 fariĝis la administranta direktoro de EPA
- fariĝis la direktoro de Universala Homama Asocio Internacia
- fariĝis la deĵoranto de Mongola Centro de Universala Homama Asocio
- La konsilianto de la Loka Kongresa Komitato por la 6-a Azia Kongreso de Esperanto en Ulanbatoro, Mongolio organizis la unuan mondanigitan vilaĝon nomatan "Guchinus" en Mongolio, kunlabore kun ĝia vilaĝo kaj Mongola Centro de UHA
- 2010 okazigos la 6-an Azian Kongreson de Esperanto en Ulanbatoro

## Deklaro de miaj intencoj

Mi mem estas membro de Mondofederalisma Movado en Japanio kaj esperantisto dum 37 jaroj. Mia e-ista antaŭulo, s-ro ITOO Eizo estis konsiliano de Mondocivitana Movado en Japanio dum longa tempo. Se mi povus ludi rolon kiel ponto inter la agadoj de la Mondocivitana Movado, Mondofederalisma Movado kaj Esperanto-movado, precipe en orienta azio kaj japanio, mi estus tre ĝoja.

*originale verkita de la kandidato en Esperanto*